

Ora Ĵurnalo

Numero 16, Marto 2019



Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo!

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Marsuloj	20
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Bona vizito ĉe Knippleholmarna, Torslandaviken en Gotenburgo en januaro 2019, <i>Jan Hellström</i>	20
Espe-Porko meditas	3	La velŝipo Magdalena – Segelskutan Magdalena	21
Esperanto-Sabato kaj la Jarkunveno en 2 marto 2019.....	3	Segelfartyg – Velŝipoj.....	22
El "La konstrulaboristo" – Byggnadsarbetaren	4	La butikoj Ängsklockan (herbeja kampanulo) translokiĝis de montega areo en Sälen ĝis Partille, apud Gotenburgo	24
Siv demandas – Ralf Jalming respondas	7	Handarbete – manlaboro (mano = hand, laboro = arbete)	25
La Vasa skikonkurso	7	La enteriga ceremonio de Jarl Hammarberg.....	26
"Vasaloppet" la 3:an de marto, 2019	8	Möte med Jarlo – Inga Johansson berättar	27
Internacia tago de virinoj – 8 marto	11	Forpasis Jarl Hammarberg, aŭtente eksperimenta poeto.....	27
Naŭruz-festajn gratulojn el 2760-jara Samarkando!	13	Pri Ebbe Vilborg en la gazeto de UEA, Revuo Esperanto.....	28
El Pollando, letero de Lucyna en februaro... 14		Sommardagar i Göteborg – prova en intensivkurs i Esperanto.....	29
El Facebook	15		
La e-klubo Toronto festas	15		
Doggers bank.....	16		
La trezoreja insulo.....	17		
Robert Louis Stevenson.....	17		
Kaperite!.....	18		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espe-Porko meditas



- La unuan dimanĉon de marto okazas ĉiun jaron la **Vasa skikonkurso**. Neĝo devas esti en Dalekarlio, sed nepre ne en Gotenburgo. Norvego gajnis inter la viroj kaj svedino inter la virinoj. Ingegerd aldonis multajn bildojn kaj aludis la "fondinton de Vasaloppet", la reĝon Gustav Vasa.
- La 8an de majo estas la **Internacia tago de virinoj**. Konata virino estas ja Greta Thunberg, kiu atentigas la povohavantojn, ke urĝas prizorgi la klimaton. Agu NUN! Kaj multaj gelernantoj diversloke strikas por la klimato.
- **La maro** estas la temo de ĉi tiu numero. Unu el niaj plej bonaj muzeoj en Gotenburgo estas la **Ŝipirada Muzeo** (sur la kovrilo). Lasse Granat donas al ni boatterminojn. Vere interesa mondo!
- Kiam ni atendas la printempon ni povus legi pri **Lasse Gatenhielm** kaj aŭskulti unu aŭ du kantojn pri maristoj farite de la grupo Kajto, Nederlando, kiu ĉefe konsistas el instruistoj pri muziko. Retadreson vi trovos ie en la ĵurnalo. Post Magdalena venas "Ni hisu la velojn", kiun ni kantis en Pollando en septembro.

- Denove troviĝas artikoloj pri **Ebbe Vilborg** kaj **Jarlo Martelmonto**. Kial? Ĉar ili signifis tiel multe al tiom da personoj.
- Ĉiam skribu nomojn, lokon kaj daton sur viaj fotoj! Mankas sur multaj fotoj en la biblioteko de Stannum. Kontraŭe – gazetaj bildoj havas identecojn. Legu pri Erik Johansson, kiu dum dura milito iris por edziĝi kun holandanino, kiu poste fariĝis gotenburĝanino.
- Pri "nova metodo varbi esperantistojn" vi povas legi en "El Facebook" – kaj nun ankaŭ en nia gazeto. Aplaudojn por Paulina Jaworska, la nova prezidanto de la pola esperantoklubo Torento.
- Ĉu reklamo en Ora Ĵurnalo? Malofte, sed la posedanto de la manlabora butikoj Āngsklockan, petis nin doni al ŝi la esperantovortojn de la svedaj manlaboraj vortoj. Kompreneble tian peton ni vere ŝatas.
- Leterojn el Gdansko kaj Samarkando ni bonvenigas! Tio montras la globalan ideon de Esperanto!
- Baldaŭ estos aprilo. Ne forgesu plani por la somero. La somera intensa kurso en Gotenburgo okazos 24–28 junio.

Bonvenon!

Esperanto-Sabato kaj la Jarkunveno en 2 marto 2019



En la jarkunveno la nunaj estraranoj estis reelektitaj, krom Helfrid Karlsson, kiu post multaj estrarjaroj rifuzis reelekton. Ni kore dankas ŝin pro la jaroj kiam ni havis la plezuron kunlabori kun ŝi!

Sur ŝia posteno Inga Johansson prenis sur sin la taskon. Ni kore bonvenigas ŝin! Inga ofte estis eksterordinara membro de la estraro, kiam ni bezonis ŝian konon pri libroj, bibliotekoj kaj ekspozicioj.



Solie vizitis nian jarkunvenon.

La estraro de Esperanto-Societo de Gotenburgo dum 2019 konsistas el Siv Burell – prezidanto, Ingegerd Granat – vicprezidanto, Andreas Nordström – sekretario, Magnus Löndén – kasisto, Margareta Andersson kaj Inga Johansson – ceteraj estrarmembroj.

Tradicie la partoprenantoj estas regalitaj per sandviĉa torto. Ni havis gaston de Stokholmo, Soile Lingman (plej proksime sur la supra bildo).

Laŭ principo la jarkunveno ĉiam estas en la sveda.

Dum la Esperanto-Sabato ni spektis malnovajn fotojn, kiuj ordinare troviĝas en la biblioteko de Stannum. Ni konstatis ke mankas kaj datoj kaj nomoj sur la plej multaj

el la fotoj. Mi ne scias ĉu la du malsupraj fotoj havas koneksojn. Ambaŭ temas pri kursoj. La grupfoto devenas de esperanta kurso en Helsingör en 1938. Ne multaj gejunuloj ŝajne ĉeestas.

Hodiaŭaj instruistoj renkontas la samajn problemojn pri la akuzativo. Ĉu estas iu el la legantoj, kiu scias kiu estis Bronislava, kaj kiam kaj kie la foto estis farita? / Siv




Francisco kun kio restas de la torto.



El "La konstrulaboristo" – Byggnadsarbetaren

(sindikata gazeto) de 1977



Maldekstre la paro Ekström, dekstre la paro Johansson.

"MR ESPERANTO" li estas nomata, la eksa konstrulaboristo **Erik Ekström**, 79-jara, Gotenburgo, ĉar li estis unu el la unuaj, kiuj lernis Esperanton en Svedio. Li vojaĝis en la mondo, renkontis homojn, skribis leterojn kaj ankoraŭ hodiaŭ li havas kontakton kun esperantistoj ĉirkaŭe en la mondo.

Erik Johansson, ankaŭ pensiita konstrulaboristo, estas la prezidanto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Li havas 69 jarojn. Ankaŭ en maljuna aĝo ambaŭ daŭrigas la batalon por Esperanto, kiu krom lingvo ankaŭ funkcias kiel paca movado. Unu lingvo – unu popolo, estas ideo kiu baziĝas sur paco kaj interkompreno.

Tiele ne estas surprize ke Hitler, Franco kaj Stalin faris ĉion por haltigi la evoluon de Esperanto. Ili sentis timon de la ideo pri interkompreno inter la popoloj, kaj Hitler rigardis Esperanton "la lingvo de la judoj". Aparte la esperantoorganizoj de la laboristoj falis en malbonan situacion. Multaj el la membroj estis fortaj batalantoj kontraŭ la

naziismo. Oni povas klarigi la antipation de Stalin per timo de kontaktoj kun la eksterlando.

Erik Johansson havis kontakton kun la lingvo per senkosta kurso de la kooperativa societo en 1924:

– Ŝajnis interese kaj la lingvo estas facile lernebla. Poste mi komencis korespondi kaj vojaĝi.

– Tiam li estis vagabondo, diras lia edzino sinjorino Lilly.

Mirinde estas la esperantohistorio de Erik Johansson. Povus esti la romantika ingredienco de milita filmo. Erik estis ricevinta la unuan lecionon pri la lingvo per SSU (la junulara societo de la socialista partio) en sia hejmvilaĝo Vårgårda, kaj serĉis leteramikojn per gazeto. Unu el la respondoj venis de knabino en Holando, kiu fariĝos lia edzino. En 1939 Erik vizitis Johanna por la unua fojo, sed kiam ili du jarojn poste

geedziĝus en Roterdamo, la infero estis eksplodinta. Tamen Erik trajnvojaĝis tien.

– Fariĝis streĉe. En Hamburgo mi devis savi min en ŝirmejon, kiam venis la aviadila alarmo. Neniu trajno pluiris al Holando, kiun la germanoj ĵus ekokupis.

Esperanto estis malpermesita, tamen Erik portis la verdan stelon, kaj tiu fariĝis lia savo.

– Juna holandano alparolis min kaj helpis min veni kien mi intencis iri en la bombita Roterdamo. Sola mi neniam estus elturniĝinta.

Erik kaj Johanna geedziĝis en la Urba Domo. Aŭtomate Johanna fariĝis sveda civitano, kaj ili translokiĝis al Svedio kaj Gotenburgo.

– Sed nun ni ne plu bezonas interparoli esperante, Johanna diras en la sonora sveda.

La familioj Ekström kaj Johansson kredas pri la estonteco de Esperanto, kaj ili eble troviĝos en la Universala Mondkongreso en 1979 en Varna, Bulgario.

– Estas eksterordinara travivaĵo renkonti homojn el la tuta mondo, kiuj parolas la saman lingvon, diras Erik Johansson.



Kie kaj kiam estas ĉi tiu foto farita? Bo Sandelin identigis Paul Nylin sur la unua vico. Neniu alia povus havi tiajn lipharojn.

Posttagmeze la Esperanto-Sabato daŭriĝis kiel kutime per kursoj en niveloj.

Siv demandas – Ralf Jalming respondas



Siv: En malnovaj tempoj la Esperanto-Societo de Gotenburgo havis proprajn lokalojn. Kiujn?

Ralf: Kelkajn jarojn ni estis en la domo de la Laborista Instituto en Magasinsgatan. Ni uzis kelkajn ĉambrojn en angulo de la domo. Tie

ankaŭ troviĝis aliaj societoj, ekz. Föreningen Norden. La social-demokratoj havis bibliotekon tie. En la aŭlo sur la supra etaĝo oni povis havi pli grandajn aranĝojn. Nun estas antaŭlernejo en la domo.

Ni devis forlasi tiun lokalon – mi ne scias la kialon.

Poste ni ricevis lokalon en malnova fajrobrigadejo, transflanke de Heden (sporta areo). Estis sufiĉe bona lokalo kaj ni sentis nin komforte. Tamen, post kelkaj jaroj ni estis devigitaj forlasi ankaŭ tiun lokalon, ĉar oni devis malkonstrui la domon.

La sekva lokalo estis en Masthuggsliden 1, bona ejo, sed ĝi situis en teraso kun multaj ŝtupoj de supre kaj multaj de malsupre.

Siv: Ĉu estis multaj kursoj en tiu tempo?

Ralf: Erik Johansson gvidis kursojn dum kelkaj jaroj. Mi mem ankaŭ, sed nur je kelkaj okazoj. Mi pensas ke Margareta Hansson havis kursojn por pensiuloj en Magasinsgatan tagtempe.

Siv: Ĉu estis pli da junulaj membroj tiam?

Ralf: Mi pensas ke ne. En la kursoj estis kelkaj. Ni havis kunvenon marde je 19–21h. "Malfermita domo", mi diru. Ne estis programo ĉiun semajnon, sed unufoje monate ni strebis havi ion. Dum la jaroj en Magasinsgatan ĉefe venis maljunaj viroj. Krom Erik Johansson mi memoras Ivar Jentzell, Arne Bengtsson, Gustav Nygård, Lennart Åberg kaj Edward Schuldenfrei. Schuldenfrei estis judo, kiu venis el Pollando antaŭ la milito. Antaŭe li gvidis kursojn, sed kiam mi renkontis lin, li estis tre maljuna kaj sidis en angulo legante libron.

Siv: Ĉu tiam ofte venis vizitantoj de aliaj landoj?

Ralf: Okazis! Aparte en la fino de la 80aj jaroj venis poloj, ĉar tiam fariĝis pli facile vojaĝi. Mi memoras Sofia Fornalowa kun sia edzo Jerzy, kiuj plurfoje vizitis Svedion. Aliaj venis ekzemple de Estonio kaj Bulgario. Estas multe pli por rakonti, sed oni ja forgesas.

Siv: Koran dankon, Ralf!

La Vasa skikonkurso

La unuan dimanĉon ĉiun jaron okazas la Vasa skikonkurso.

Ĉi tiun jaron pli ol 50 000 skiantoj startis kaj atingis la cellokon Mora. 3 135 personoj interrompis la konkurson pro diversaj kialoj.

La distanco estas pli ol 90 kilometroj kaj la vetero ne estis favora. El la partoprenantoj 16 % estis virinoj kaj 84 % viroj. Multaj preferas skii la distancon dum la pli frua "vintrosemajno" kaj tiam 37 % virinoj partoprenis.

Al la Vasa skikonkurso venis konkursantoj el 64 nacioj – entute ĉirkaŭ 10 % el la tuta skiantaro estis eksterlandanoj.

La norvego Tore Bjørset Berdal gajnis la konkurson inter viroj. Li bezonis nur 4.39.15 horojn. La duan kaj trian premiojn ankaŭ gajnis norvegoj.

La svedino Britta Johansson Norgren gajnis la konkurson inter virinoj kaj bezonis 4.54.24 horojn. Bonege!

Nia princo Carl Philip partoprenis ĉi tiun jaron. En 1977 lia patro Carl XVI Gustav ankaŭ sukcesis atingi la cellokon Mora.

/ Siv

”Vasaloppet” la 3:an de marto, 2019



Serĉata

en la jaro de nia Sinjoro, 2019

Gustav Eriksson Vasa

patro de la Sveda popolo.

Dum la malapero li estis vestita per skioj kaj larĝgranda ĉapelo.

Informojn pri la malaperinta viro bonvolu disdoni ĉe la stacioj laŭ la vojo al Mora.



Kontrolejoj kun mirtelsupo: Berga vilaĝo en Sälen, kaj en Smågan, Mångsbodarna, Risberg, Evertsberg, Oxberg, Hökberg, Eldris kaj Mora.

Ĉio havas komencon, kaj ankaŭ longedaŭraj promenoj komencas per la unuaj paŝoj...

La starto

Duonvoje al Mora, mi volas scii kiu aperos unue en Mora? Sed kie kaŝas sin Gustav Eriksson Vasa? Ĉu li povas kaŝi sin malantaŭ la frostmordita barbo de tiu viro?



En Evertsberg



Aŭ ĉu tiu viro, olda kaj kun stranga ĉapelo?




Aŭ la alta viro kun flava kaj blua peltĉapo, ĉu ne?



Aŭ ĉu povas eĉ la fama juristo scii ion. Lin ĵus preterpasis lia edzino.

Thomas Bodström



Carl Philip

Sed nun, rigardu! Iu kuras per skioj. Ĉu li estas reĝa? Mi vere pensas tion!
Ĉu li havas informojn pri Gustav Eriksson Vasa? Sed li ne volas paroli pri tio.
Anstataŭ li deklaras ke li manĝis sukeron.
Tamen, li ekhavis bonan rezulton, 8.12.41. Tre bone!



Aŭ la plej forta virino de la nuna tempo kiu nun spurtas al la celo en Mora.

Mi ĉiam diras ke "virinoj povas"!

Britta sur skioj



Trifoje la norvegoj estas unuaj en la celo. Oro, arĝento kaj bronzo! Kiel ni en Svedio povos akcepti tiun malhonoron? Hontege kaj elrevige!

Sed ni povas ĝoji pro Britta Johansson Norgren kiu nun ricevas la laŭran kronon de dalekarliano.



- Rigardu!
- Tie li estas, malantaŭ la ŝildo.
- Do, li estas la unua en Mora. Li venis jam en 1520!
- Li aspektas maljuna kaj lacega.
- Sed la premio??? Kie???

/ Ingegerd

*En la piedsignoj de la prapatroj
– por estontaj venkoj.*

Internacia tago de virinoj – 8 marto



El Vikipedio:

La iniciatinto nomiĝas Clara Zetkin, germana komunisto. La 8an de marto atentiĝas la malegaleco inter viroj kaj virinoj tra la tuta mondo. Inter 1933 kaj 1945, tiu tago estis malpermesita en

Germanio, pro la partopreno de la socialistoj, kiuj kreis la tagon. Post 1978 la Internacia Tago de Virinoj troviĝas inter la festotagoj en la listo de U.N. Pro la agnosko de U.N. la tago pli kaj pli perdis sian politikan

signifon kiel socialista bataltago kaj fariĝis nepolitika festotago.



En multaj landoj la simbolo de la internacia tago de virinoj estas branĉeto de akacio.



Clara Zetkin kune kun Rosa Luxemburg (1910).

Kelkaj datoj

- 1910: En Kopenhago, dum la Internacia Socialista Virina Konferenco, laŭ propono de Clara Zetkin, oni decidis realigi la ideon pri *internacia virina tago*.
- marto 1911: Unu miliono da virinoj protestmarŝis en Eŭropo.
- 8an de marto 1913: Rusaj virinoj organizis kaŝitajn renkontiĝojn.
- 8an de marto 1914: Virinoj postulis voĉdonrajton en Germanio.
- 8an de marto 1915: En Oslo, virinoj defendis siajn rajtojn kaj postulis pacon.
- 8an de marto 1917: «Februara revolucio» en Rusio. En Sankt-Peterburgo laboristinoj protestmarŝis por postuli pacon kaj hejmenvenon de la edzoj.
- 8an de marto 1921: Lenin deklaris la 8an de marto Virina tago.
- 1924: La tago estis unuafoje celebrite en Ĉinio.
- 1946: La tago estis unuafoje celebrite en Orient-Eŭropo.
- 8an de marto 1947: Léon Blum substrekis la gravan rolon de virinoj dum la rezisto.
- 8an de marto 1977: La Unuiĝintaj Nacioj oficialigis la **Internacian tagon de virinoj**.
- 8an de marto 1982: Oficiala statuto de la tago en Francio.
- De 2006 japanaj virinoj batalas kontraŭ la abolon de la 9a artikolo de la japana konstitucio. Okaze de la internacia tago de virinoj Esperantaj pacmesaĝoj el la tuta mondo estas tradukitaj japanen kaj ekspoziciitaj en Hiroŝimo.

En la sveda Almanako ekde 1993 Siv havis nomtagon la 8an de marto, unue kune kun Saga, tempe sola, sed nun denove kun Saga.

- **1993–2000** – Siv kaj Saga
- **2001–2017** – Siv
- **Ek de 2018** – Siv kaj Saga

Esperanto-movado

Aktivas grupo de Esperantistoj en Hiroŝimo ĉiujare por kolekti solidarecajn mesaĝojn el la tuta mondo okaze de la virintago. Tiuj mesaĝoj estas tradukitaj en la japanan kaj ekspoziciitaj dum diversaj okazaĵoj.

En 2010 alvenis al Hiroŝimo 344 mesaĝoj el 66 landoj. / Siv

Naŭruz-festajn gratulojn el 2760-jara Samarkando!



Samarkandiana

8 marto 2019

LA INTERNACIAJ LETERTAGOJ "ASSALOM, NAŬRUZ 2019!" ("SALUTON, NAŬRUZO 2019!") EN 2760-JARA SAMARKANDO, "KORO DE LA GRANDA SILKA VOJO", URBO DE MONDA HEREDAĴO DE UNESKO.

✉ *Karaj amikoj, samideanoj, kolegoj,*

Printempo estas ĉi tie kaj baldaŭ, la 21-an de marto, venos Naŭruzo, orienta Novjaro, unu el la plej belaj kaj ŝatataj festoj en Uzbekio kaj pluraj aliaj landoj. Ni kredas, ke dum tiu ĉi festa sezono vi ĝuas renovigitajn esperojn kaj revojn, same kiel agrablajn rememorojn pri la pasintaj celebraĵoj.

Naŭruzo (signifanta 'Novan tagon') estas popola simbolo de vekiganta naturo, printempo, bono, paco kaj nova vivo. Menciindas, ke Naŭruz-festo estas enskribita sur la Reprezentan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

En 2010 la Internacia Naŭruz-Tago estis proklamita laŭ la decido de la Ĝenerala Asembleo de UNO.

Bonvolu sendi viajn gratulleterojn, eventualajn pensojn/sentojn pri Naŭruz-sezono ktp, plejble baldaŭ ĝis la 15-a de marto 2019 al nia retadreso: imps86@yahoo.com.

ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj. La plej interesaj kontribuaĵoj aperos en nialanda gazetaro.

Intertempe, akceptu niajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de alvenanta Naŭruzo!

Fartu bone kaj havu agrablajn printempajn tagojn plenajn je natura vekigo, fruktodona renovigo, blua ĉielo, birdaj kantoj, florantaj ĝardenoj, malavaraj sunradioj, ridetoj...! Ni kore deziras al vi, viaj familianoj kaj al ĉiuj niaj samesperantuĵanoj kaj samteranoj belan Naŭruz-feston, bonan kaj agrablan novan jaron en sano, bonhumoro kaj feliĉo! Ni volus dividi kun vi ĝojon de renaskigo de vivo, suna varmo, hela espero, amo, paco, amikeco kaj kreiva inspiro. Ĉiu tago de via vivo estu kiel Naŭruzo!

Atendante vian baldaŭajn reeĥojn, ni antaŭdankas pro viaj asisto kaj eventuala kunlaboro.

Geografie malproksime, sed Naŭruz-feste proksime via, Anatoli Ionesov, kunordiganto de la projekto.

Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto", P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando, Uzbekio. Retpoŝto: imps86@yahoo.com

P.S. Bonvolu, se eble, plusendi tiun ĉi anoncmesaĝon al viaj kolegoj, amikoj ks. Dankon!

✍ *Kara Anatoli Ionesov,*

Kompreneble estas interese celebri Naŭruz kaj aparte irananoj – oftaj rifuĝintoj en Svedio – celebros Naŭruz. Sur granda area en Gotenburgo oni havos etajn fajrojn kaj homoj saltas super ili. Svedoj kutime ne celebras tiun tagon, nur se ili havas iranajn geamikojn.

Hodiaŭ la 8an de marto ni kaj tuta Eŭropo havas alian celebron. U.N. proklamis la 8an de marto "La Internacia Virina tago". Oni strebas por ke virinoj havu la samajn rajtojn kiel viroj, la saman salajron por la sama

✍ *Kara Siv Burell,*

Ni bonorde ricevis vian afablan reeĥon kaj ni adresas al vi kaj viaj samlandaninoj sincerajn gratulojn okaze de la Internacia Virintago, kiu estas vaste celebrata la 8-an de marto ankaŭ en nia lando Uzbekio, kie ĝi estas oficiala ŝtata festo kaj nelabora tago.

laboro, la saman politikan eblecon influi sur la societo k.t.p.

La politika aspekto nun ne estas tiel forta kiel antaŭe. La tagon multaj landoj celebras same kiel la "Tago de patrino" aŭ "la Tago de ĉiuj koroj".

Ni deziras al vi Feliĉan Naŭruz!

La Esperanto-Societo de Gotenburgo, Svedio.

Siv Burell

Sanon, bonfarton, feliĉon kaj sukcesojn en via nobla aktivado por pli bona mondo!

Amike kaj bondezire,

Anatoli

El Pollando, letero de Lucyna en februaro


✍ *Saluton Siv,*

Venis al ni jam printempo kaj kun ĝi iomete da novaĵoj. Dimanĉe ni elektos novan prezidanton en nia urbo Gdansk kaj marde novan prezidanton en nia klubejo restos Paulina (tiaj estas planoj).

De kelkaj tagoj ni jam havas belan sunon kaj dumtage estas vere agrable.

Lastfoje, Elvira, Marek kaj mi faris agrablan promenon ĉe nia marbordo. Kvankam estis frua horo multe da homoj promenis sur la strando kaj birdoj atendis manĝaĵon de ni. Ni deziras al vi sanon, feliĉon kaj ĝojon dum tiu frua, bela kaj suna printempo.

Lucyna kaj Marek



Ne estas neĝo, sed sablo sur la strando de la Balta Maro!

El Facebook

Jagoda Greger skribas al *Esperanto Sopot* 5 marto:

Triurba Esperantista Asocio TORENTO havas novan Prezidantinnon – Paulina.

Juna kaj energia. Granda sukceso de iom maljuna estraro. 😊



Paulina metis tiun bildon en sian hejmpaĝon kaj Sten Svenonius demandis: "Ĉu la nova metodo varbi esperantistojn?" / Siv

La e-klubo Toronto festas

El la Fejsbuka paĝo de Jagoda Greger, la pola esperanta klubo Toronto. La ĉapelojn ni rekonas de "Esperanto sur la strando" de septembro 2018.



Doggers bank

*El la libro "Estas multo kion oni ne estas devigita fari" de la verkisto **Tomas Sjödin** Ingegerd trovis la ĉapitron pri la vetera raporto. Jen ĝi en esperanta traduko:*

Estas nenio tiel amuza kiel aŭdi la veterprogonzon por maraj regionoj.

Tio montras, ke pli multaj personoj ol mi, aŭskultas ĝin preskaŭ en rita maniero kaj opinias ke sento de pia sentado venas, dum knaraj voĉoj el "Norrköping" ekzorgas nin pri la plej diversaj marprovincoj.

La vortoj – nekonataj sed tamen tre konataj – rulas el la radio kiel laĉo de perloj:

"Doggers bank", sudsudokcidente, po kvar metroj sekunde. Iom post iom malpliigante. "Måseskär" sudokcidente tri. Bona videblo, kaj la vico da nomoj daŭriĝas: Fladen, Fiskebankarna kaj Suda Utsira.

Temperaturoj leviĝas kaj malleviĝas. La ventoj turnas kaj turnas denove.

Forta brizego maltrankviligas okaze sed forlasas por ĉiam. Devas forlasi.

La mitaj ejoj, kies nomojn oni aŭdis infanece, sciigas ankaŭ ke la plej malfacilaj perturbaj veteroj pli malpli frue cedas.

Malgraŭ ke oni neniel havas bezonon de tiuj informoj por la ĉiutaga vivo, – estas egale se uragano blovas kaj "pluvas najletoj" ĉe "Hoburgen" se la suno brilas hejme en "Säve" – tial estas la raporto de mara regionoj ne estas malgrava tasko por labortagoj. La mara raporto apartenas al la ĉiutaga vivo. Estus enuige se ĝi ne ekzistus.

Tiel longe kiel SMHI en "Norrköping" trifoje tage vokas de sia minareto estas ĉio trankvila. La mondo restas – kaj troviĝas homoj kiuj ellitiĝas je la mateniĝo kaj kontrolas tion ĉi.



Kaj mi volas scii ĉu la ventoj malpliĝas aŭ pliĝas ĉe Arkona kaj mi demandas pri la glaciraporto ĉiutaga, aŭskultas kiel la dikeco de glacio estas kaj kien la glacirandoj iras momente. Estas agrable scii tion kaj certe oni sentas sin eta kaj plej humila se oni scias kiam blovas forta brizego sur "Kattegatt".

Kelkfoje mi pensis ke la mara raporto estus perfekta programideo por televido. Simila troviĝas jam en Usono kie televidaj kameroj gardas multajn strandojn. Tie temas ne pri vivnecesaj informoj por maristoj kaj fiŝkaptistoj, sed pri servado por sunbanuloj, sed tamen...

Ne, fari televidprogramon de mara raporto estus profanigi ĝin.

Estas avantaĝo ne koni kiel "Almagrundet" aspektas. La fantazio liberiĝas.

Dum kelkaj elektitaj minutoj oni ĉirkaŭŝvebas la svedajn marbordojn.

Oni ĵetas sin tien kaj reen sur la agitita maro, oni aŭdas kiel la vento fajfadas en la mastoj

sur zorgeme alligitaj ŝipoj kun kriantaj mevoj, sed oni imagas ankaŭ trankvilajn golfojn, kie nenio, nepre nenio, okazas. Malproksime de civilizo la vivo estas tute kvietita. La rondiro ĉirkaŭ la svedaj marbordoj estas la velirado de animo. Ĝi ekvilibrigas nian spiriton kaj moderigas la maltrankvilon. Kiu zorgas se la borso en Tokio venas supren aŭ malsupren. Kiu emas sekvi se la Astra akcioj supreniras aŭ falas.

La nebuloj disiĝas ĉe Doggers bank kaj la vivo pasas.



La trezoreja insulo

de la verkisto Robert Louis Stevenson



La gastejo "Amiral Benbow", kiu situas sur la angla okcidenta marbordo, ekhavas viziton en la dekoka jarcento de alta, fortika, avelkolora viro.

Li estas pirato kaj venas lamete kun la mar-

kesto sur ĉaro kaj la gudrita harplektaĵo pendante super la ŝultroj kaj kun sabra cikatro sur vango.

"Dek kvin fantomoj sur la kesto de morta viro hola ho kaj botelo da rum'!"

estas lia rekoniga melodio dum la tempo li loĝas en la gastejo.

En lia kesto troviĝas marmapo kiu montras trezorejon kun rekonila marko de trezoro de kapitano Flint.

La oldaj amikoj de kapitano Flint ankaŭ havas intereson pri la mara mapo. Iun tagon ili ekatakas la gastejon sub komando de la blinda pirato Pew en la fronto. Ili volas ŝteli la mapon kaj sendanĝerigi la maljunan piraton.

Sed ek de tiam estas la mapo for. / Ingegerd

Robert Louis Stevenson

n.1850 – m. 1894

Stevenson naskiĝis en 1850 en Edinburg. Li estis la unua infano de sveda, fama lumturkonstruisto. Troviĝis multaj inventistoj en la parenkaro, sed la juna Stevenson volis skribi.

Stevenson naskiĝis kun malbonaj pulmoj kaj elkreskis kun malsaneco. Li skribis, sidanta en la lito.




Oni komprenis ke la dura klimato en Skotio ne taŭgis por Stevenson.

Li komencis jurajn studojn. Liaj unuaj libroj riceviĝis tre bone. Kiu ne havas konon pri la libro "Skattkamarön" (La trezoreja insulo) hodiaŭ?

Stevenson estis devigita vojaĝi al ejoj kun pli bona klimato kaŭze de la malsano. La lastan tempon de sia vivo li loĝis sur la Samoaj insuloj en la Suda maro.

Tie li estis amata de la insulaj loĝantoj, kiuj nomis lin "Tusitala", kiu signifas fabelrakontiston kaj pri tio ni ĉiuj samopinias.



La Gatenhielma blazono

Kaperite!

de Ingegerd Granat

– Ho, atentu! Nun vi gratis mian dekstran flankon!

– Kial vi ne portas tabulŝirmilojn – vi ja tute nescias navigi, bubaĉo!

Estas posttagmezo en la boateta haveno de Fiskebäck en Gotenburgo, kaj unu bataleto post la alia aŭdiĝas vaste ĉirkaŭe sub la forta somersuno.

Meze inter la multaj diversaj flosaĵoj, kiuj kuŝas flankon ĉe flanko, ronĝante la konkordon inter la egale multaj diversaj ŝipanoj, nun videblas la svaga konturo de granda malnovtempa ŝipo, kiu alproksimiĝas.

En la haveno por boatetoj la granda velboato "Lena" ĝuste debordiĝas. Ĝi havas du mastojn, kie veloj estas elmetendaj, kaj ne

nur tio: oni volas hisi ankaŭ ruĝan spinakon. Estas kurado tien kaj tien-ĉi sur la granda ferdeko. Blasfemoj elsaltas sur la marsurfacon anstataŭataj de novaj, laŭ tio kiel novaj ĝenaĵoj okazas surŝipe.

La ŝipano sur la boato plubaraktas dum sia foriro, kaj la situacio fariĝas riskega, kiam ĝi alproksimiĝas al alia velboato, kiu ĝuste nun troviĝas sur loko, kie ĝi ne estis en la momento kiam "Lena" komencis retroiri.

Forta krako subite aŭdiĝas, eĥiĝante inter la montoj kaj ŝtonoj ĉirkaŭe. Tio okazas kiam "Lena" frakasiĝas kontraŭ la flanko de la alia boato, kiu portas la nomon "Ĉasisto". Krioj, insultoj kaj ofendoj estas malavare interŝanĝataj inter la ŝipanoj de la du velboatoj.

Eĉ pli forta bruado ekestas, kiam la bela olda ĥimerŝipo, kiu alproksimiĝis de la maro, krake enpremiĝas inter la du batemuloj. Aŭdiĝas kvazaŭ tondra krakego, kaj la aero tremetas kiel alta karamelpudingo en la somervarmo.

La maristoj sur la du boatoj rigidiĝas kvazaŭ ŝtoniĝintaj sur siaj ferdekoj ambaŭflanke de la granda kaperŝipo "Levreleto" el la 17-a jarcento. La tempo haltis.

Sur "Levreleto", kontraŭe, ĉio moviĝas. Viro kun lorno staras en la pruo disdonante ordonojn. Li estas vestita per malhela, longa mantelo kaj ĉapelo triangula. Fulmetas kaj briletas ĉiuj liaj oraj butonoj kaj borderaĵoj.

– Kia kanajlaro kaj fiularo navigadas sur miaj marvojoj, li kriegas, tiel ke eĥas super la maro.

La ŝipanaroj de la aliaj boatoj ankoraŭ staras kvazaŭ ŝtoniĝintaj en siaj movoj.

– Alŝipigu la kuvojn kaj kaperu ĉion, kio iom valoras, kriegas la viro kun la lorno. Mi estas la reĝa kaperisto Lars Gathenhielm, kaj mi ne eltenas la vidon de tiuj ĉi terulaĉoj, kiuj forestu de la maro. Poltronoj kaj moluloj restu surtere! Enŝlosu la ŝipanarojn plej profunde en la ŝipanejo! Ili laŭiru la dilon tuj kiam mi estos sur la libera maro.

Dum unu ondoplaŭdo la du boatoj estas prenitaj por fortrenado. Ili estas prirabitaj kaj perdintaj ĉiujn velojn, ĉiun ekipaĵon, velaron, instalaĵon kaj aliaĵon facile forpreneblan kaj transporteban al "Levreleto". Laĉjo de Gatan perplekse rigardas kompu-telefoneton, kiun li tenas permane.

– Pro la diablo, kio estas tio ĉi? Mi ne scias, li poste diras kaj ĵetas la telefoneton per vasta arko eksterŝipen. Poste li ekkaptas velon. Ĝi

estas ruĝa, kaj sur ĝi estas io skribita per blankaj literoj.

– Diable, mi ja ne scias legi... – Venu ĉi tien – legu! li diras al viro, kiu estas vestita en piĵamo. Estas ŝipano, ĝuste trenita sur "Levreleto".

– Jen ja nia spinako, li diras indigne.

– Spinako, spinako... Nur legu, kio estas skribita!

– Estas skribite "Friskis och Svettis", respondas la ŝipano.

– Kion signifas tio? demandas la kapitano.

– Friskis och Svettis estas la trejniĝejo, kiu pagis por la spinako – ĝi estas unuiĝo, en kiu oni kuradas, kvankam oni estas survoje nenien.

– Ĉiuj ferdeken! ekkrias la kapitano. Ek!

